Reunia noktardeo

La **Reunia noktardeo** (*Nycticorax duboisi*) estis formortinta birdospecio de ardeo iam loĝanta en la maskarena insulo de Reunio.

Ĝi estis dumlonge konata nur el unusola priskribo, nome tiu de Dubois publikita en 1674. Li parolis pri:

> „ Botaŭroj aŭ Grandaj Egretardeoj, grandaj kiaj kastritaj kokoj, sed tre dikaj kaj bonaj. Ili havas grizan plumaron, kun ĉiu plumo makulita je blanko, la kolo kaj beko kiel de ardeo, kaj la piedoj verdaj, kiel ĉe la piedoj de la porfirioij (*Porphyrio*, W.R.). Tiu birdo manĝas fiŝojn.[1] ”

Kiam oni malkovris ostojn de subfosilioj fine de la 20a jarcento, ili estis dekomence priskribitaj sub nova nomo ĉar oni supozis, ke la origina priskribo ne estis valida. Tamen nur la genro dekomence atribuita de Rothschild estis malĝusta.

Reunia noktardeo
Biologia klasado
Regno: Animaloj *Animalia*
Filumo: Ĥorduloj *Chordata*
Klaso: Birdoj *Aves*
Ordo: Pelikanoformaj *Pelecaniformes*
Familio: Ardeedoj *Ardeidae*
Genro: *Nycticorax*
Specio: *N. duboisi*
Dunomo
Nycticorax duboisi (Rothschild, 1907)
Konserva statuso
Formortinta · Minacata · Malplej zorgiga EX · EW · CR · EN · VU · NT · LC **Konserva statuso: Formortinta**
Aliaj Vikimediaj projektoj

La Reunia noktardeo estis la plej granda specio de la genro *Nycticorax* el la Maskarenaj Insuloj kaj pli granda eĉ ol la Oceania noktardeo. Malkiel ties parencoj la Maŭricia kaj la Rodrigesa, ĝi ne estis adaptita al la surtera vivostilo; ties flugiloj estis fortaj kaj ties kruroj ne estis adaptitaj al ĉaso de predoj perpiede. Dubois mencias ke la birdoj vivtenis sin el fiŝoj.

Formorto

El ĉiuj informoj menciantaj ardeojn en Reunio, nur tiu de Dubois povas esti atribuita al tiu specio. Signife, Feuilley en 1705 ne menciis tiujn birdojn, kaj nur en la dua duono de la 18a jarcento denove oni mencias ardeojn en Reunio, kaj estas la Striardeo la ununura specio troviĝanta, sed "tre rara". Tiele, la Reunia noktardeo eble iĝis formortinta ĉirkaŭ 1700. Tamen, ĉar ne estas bonaj tialoj por tiu malapero (nek habitatodetruo nek enmetitaj predantoj povus multe efiki sur la specio, nek ŝajne estis preferata ĉelo por ĉasistoj), ĝi povus estis pluvivinta ĝis konsiderinde poste.

Notoj

1. ↑ Rothschild (1907), p 114.

Referencoj

- BirdLife International (2008). *Nycticorax duboisi* (http://www.iucnredlist.org/apps/redlist/details/150567). En: IUCN 2008. IUCN Ruĝa Listo de Endanĝeritaj Specioj. Elŝutita en 4a Februaro 2009. Kriterioj kial tiu specio estas formortinta.
- Rothschild, Walter (1907): [*Ardea duboisi*]. *In*: *Extinct Birds*: 114.

Birdoj

Regno: Animalo • Filumo: Ĥorduloj • Subfilumo: Vertebruloj • Infrafilumo: Makzeluloj • Superklaso: Tetrapodoj • Klaso: Birdoj

Birdoj laŭ ordoj *(alfabete)*

Ordoj de

akcipitroformaj ~ anseroformaj ~ apodoformaj ~ cikonioformaj ~ falkoformaj ~ fenikopteroformaj ~ gavioformaj ~ gruoformaj ~ ĥaradrioformaj ~ kaprimulgoformaj ~ kokoformaj ~ kolomboformaj ~ koracioformaj ~ kukoloformaj ~ paseroformaj ~ pegoformaj ~ pelikanoformaj ~ podicipoformaj ~ procelarioformaj ~ psitakoformaj ~ pterokloformaj ~ sfeniskoformaj ~ strigoformaj ~ strutoformaj ~ tinamoformaj ~ trogonoformaj ~ trokiloformaj ~ turnicoformaj

Rilataj artikoloj: Birdomigrado ~ Birdoprotektado ~ Birdnestoj ~ Birdkanto

Vidu ankaŭ: Dinosaŭraj birdoj

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Reunia_noktardeo&oldid=5839910"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 18:40, 24 dec. 2015.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.